

sub la suda kruco ★

ESPERANTO

Bonan vojaĝon!


Vizito al monto kaj kavernoj

Instruistoj por nia somerkursaro

Agadoj de AEA

La projekto lingvohelpilo

Raportoj el Esperantio



oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 16[6] • numero 96 • novembro–decembro 2008
ISSN 1038-9380

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

volumo 16 [6] • numero 96 • novembro–decembro 2008

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Sándor Monostori

Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au

P.O.Box 1097

Bendigo Central Vic 3552, Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au

NZEa | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15a de januaro 2009

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2008, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Sur la kovrilo: La palaco *Branicki* en Bialistoko, Pollando, la urbo de la 2009a Universala Kongreso.

Enhavo

4

Antaŭparolo

5

Correspondence courses of AEA

6

Instruistoj por nia somerkursaro

8

Raportoj el Esperantio

10

Vizito al monto kaj kavernoj

14

Rakonto pri la prelego de Penny Vos

16

Bonan vojaĝon!

19

**AEA President's Report and
Agado de la Estraro**

22

La projekto lingvohelpilo

novembro-decembro du mil ok

Antaŭparolo

Kiam vi ricevas ĉi tiun ekzempleron de *ESK*, jam alproksimiĝis la fino de la jaro. Ĉi tie en Nov-Zelando ni jam povis ĝui kelkajn semajnfinojn de belega printempa vetero. Kutime mi ne ferias kaj vojaĝas dum septembro kaj oktobro, sed kiam mia familio decidis vojaĝi en tiu periodo ĉi-jare, ni spertis tre agrablan etoson en la mezo de la norda insulo de nia lando (bv vidi la suban foton).


Onia infaneco certe forte influas onian senson por sezonoj. Mi, kiu plenkreskis en la norda hemisfero, eble neniam alkitimiĝos al kristnaska festo dum somero. Tamen, mi devas diri, ke la aĉa vetero, kiun ni en Nov-Zelando havis dum la decembroj de la lastaj jaroj, iomete helpis aperigi en mi iom da etoso por kristnasko. Aliflanke, mi ege rapide alkitimiĝis al havi la novjaran feston meze de la somero - estas laŭ mi multe pli plaĉe festi ĝin dum somera nokto.

Por la Esperantistaro de la mondo, estas eĉ plua kialo festi dum la nuna periodo en la jaro. Estas kutimo festi la naskiĝtagon de la kreinto de la lingvo, L. L. Zamenhof. Okaze de lia 150a naskiĝtago en 2009, la Universala Kongreso de Esperanto okazos en lia naskiĝurbo Bialistoko, Pollando. Unu el la vidindaĵoj tie estas la palaco Banicki, kiun vi povas vidi sur la kovrilo de ĉi tiu numero de *ESK*.

Feliĉan festan sezonon al vi ĉiuj!

Chris Krägeloh

Sube: Chris kaj Ananda apud la lago Taupo.



Correspondence courses of AEA

by Hazel Green

If you are interested in doing the correspondence courses of the Australian Esperanto Association, please go to <http://kurso.esperanto.org.au/>. On this site you will find details of our correspondence courses in Esperanto, ranging from beginner to advanced, as well as information on how to enrol.

None of the courses have a time limit, so you can complete them at your own pace. Course fees include administrative charges, cost of materials, postage and personal postal tuition, until the course is completed. Please note that members of the Australian Esperanto Association receive a 20% discount on all courses - the discount is valid even if you joined the AEA on the same day! All prices quoted are in Australian dollars.

If you decide you'd like to do a course, you can enrol by sending your NAME, ADDRESS and COURSE NAME, along with a CHEQUE or MONEY ORDER to:

Correspondence Courses of AEA
c/- Hazel Green
44 Toowoomba Road
Oakey QLD 4401

If you prefer to enrol electronically, please send the information to Hazel at kurso@esperanto.org.au and request the bank account number to deposit the fee.

If you have any questions, please contact us. ★

**" None of the
courses have a
time limit, so you
can complete them
at your own pace."**

Instruistoj por nia somerkursaro



Aŭstralia Somerkursaro
de Esperanto

Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejo!
de la 7a ĝis la 25a de Januaro 2009

- komforta loĝado en la urbocentro de Sidnejo
- kursoj por ĉiuj niveloj - kaj speciala kurso por infanoj
- vizitu la Havenponton, la Operodomon, kaj la plaĝon de Manlio
- ekkonu la ekzotikajn faŭnojn kaj florojn de Aŭstralio
- ludu, babilu kaj societumu kun esperantistoj el la tuta mondo
- eltrovu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
- ekkursu al la Kifoj kaj kavernoj de la magiaj Blauaj Montoj
- partoprenu la vigilan noktan vivon de Sidnejo - per Esperanto



<http://aesk.esperanto.org.au>

Estos multo bela kaj ĝuebla por fari dum nia kursaro en Sidnejo en januaro 2009, kaj verŝajne la plej ĝueblajn horojn ni pasigos en la klasoj. Tre bonaj instruistoj akceptis la taskon gvidi la kursojn. Jen kvar el ili.

Unu el la motoroj de la Esperanto-movado en Aŭstralio, **Penny Vos** estas sperta instruistino kiu sukcese persvadis plurajn lernejojn enkonduki esperantajn klasojn. Nun ŝi preparas bonajn argumentojn por persvadi la tutan edukan sistemon de Aŭstralio. Sed pli grave por la infanoj (4- ĝis 14-jaroj) al kiuj Penny instruos en Sidnejo, ŝi bone scias kiel kapti la atenton de la junaj lernantoj, kaj helpi ilin lerni lingvon dum ili ĝuas la sperton.



Trevor Steele jam instruis esperantajn kursojn multfoje en Aŭstralio kaj multaj aliaj landoj. Bone konata tra la mondo ankaŭ kiel aŭtoro kaj eksa ĝenerala direktoro de la Universala Esperanto-Asocio, Trevor dividas kun klasanoj sian entuziasmon por Esperanto, por Esperanta literaturo kaj por interesa historio. Li verkas ne nur interesajn romanojn, sed ankaŭ interesajn ekzercojn. Por la kvara nivelo, al kiu li instruos, li jam preparas materialon pri la libro *La ŝtona urbo* de Anna Lowenstein.

Ŝandor Horvath instruas lingvojn al homoj de diversaj kulturoj en diversaj partoj de la mondo. Li kunportas al siaj klasoj grandan talenton por instigi aktivecon kaj partoprenadon. Jam fama en somerkursaroj en Aŭstralio pro siaj ludoj kaj rakontoj pri interesaj vivospertoj, li sendube vigligos la studentojn en la tria nivelo.



Atilio Orellana Rojas estas direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto en Nederlando (<http://www.iei.nl>), sekretario de *ILEI*, "vojaĝanta instruisto" kiu jam gvidis kursojn en pli ol sesdeko da landoj. Tamen, sufiĉe ofte li trovas tempon por esti tre bonvena instruisto en la somerkursaroj en Aŭstralio. Ĉifoje li gvidos duonon de la klasoj en nivelo 1 kaj duonon en nivelo 2.



Ankaŭ **Monique Arnaud** kunportos multe da scio kaj ĝuado de Esperanto al studentoj en niveloj 1 kaj 2. Monique instruas lingvojn en sia hejmlando Francujo kaj aliaj landoj. Longtempa subtenanto de *ILEI*, Monique bone konas esperantajn lernmaterialojn el diversaj fontoj.



The Summer School in Sydney

If you are having trouble reading the articles in Esperanto in this magazine, taking a course at the coming summer school will be a great help to improve your fluency. More importantly, the classes and other activities with Esperantists will help build confidence in Esperanto conversation.

For this coming summer school, two experienced teachers from overseas will be guiding the courses in Level 1, which starts at the beginning, and Level 2 for those who already know some Esperanto. One of these teachers is Atilio Orellana Rojas, who was born in Argentina, but now lives in the Netherlands as director of the International Esperanto Institute. He trains teachers in the Cseh (direct) method of teaching Esperanto, he has taught in more than 60 countries, and has had many experiences in the Esperanto movement all over the world. He has written extensively on indigenous matters. Monique Arnaud is a very active Esperantist from France, who teaches languages in her own and other countries.

Children from 4 to 14 years are welcome to join the children's class, and will enjoy learning with experienced Australian teacher Penny Vos.

Raportoj el

Toowoomba Languages and Multicultural Festival

Ankoraŭfoje ĉi-jare, la Toowoomba Esperanto-Societo (*TES*) estis parto de la *Toowoomba Languages and Multicultural Festival* (festivalo de lingvoj kaj diversaj

kulturoj). Oni festis la diversajn lingvojn kaj kulturojn en la Toowoomba regiono per manĝaĵoj, montraĵoj, ludoj, dancoj, kantoj kaj belaj kostumoj.

Dimanĉon la 10an de aŭgusto, 9 esperantistoj el *TES*, kaj 3 el Brisbano ĝuis la buntan festivalon. Ni ja bezonis helpon de

la brisbananoj, ĉar ĉi-jare oni donis al ni spacon por du budoj en du apartaj tendegoj, kaj ni povis prezenti enkondukan lecionon dum 15 min. Dum aliaj 15 min, ni kuraĝigis homojn kanti tre simplajn Esperantajn kantojn. Kaj kompreneble ni ĉiuj bezonis tempon por vidi la aliajn grupojn, kaj gustumi manĝaĵojn. Inter niaj multaj afiŝoj estis

Maldekstre:

June Perkins parolas kun interesulo pri Esperanto. Kay Anderson staras antaŭ la Esperanta budo.



Dear Friends!

For the first time ever, the prestigious University of New South Wales (UNSW) has officially awarded an ADVANCED Certificate in Teaching Languages Other Than English (LOTE): Esperanto. The recipient of this official qualification is Miranda Lutz, who has been speaking Esperanto for over 10 years, and is an active and well-respected member of the Esperanto

community in Australia, being the current Director of Member Services for the Australian Esperanto Association.

Although a LOTE Certificate in Esperanto had been issued before by the UNSW, this is the first time the more prestigious ADVANCED Certificate has been given. In order to receive the ADVANCED certification, the post-graduate student must complete a strenuous course of research and

Esperantio

“Respect for other people and other languages” el la brita Esperanta programo *Springboard to Languages*. Iu vizitanto tiom ŝatis la afiŝon kaj ĝian vidpunkton, ke ni donis ĝin al ŝi. Ŝi uzos ĝin en sia laborejo, kie oni vartas junajn infanojn el diversaj kulturoj. Tiu kaj aliaj interesaj afiŝoj estas aĉeteblaj de *UEA*.

Membroj de la Melburna Esperanto-Kafoklubo malavare permesis nin uzi ilian novan broŝuron, kaj helpis nin iomete ŝanĝi ĝin por aldoni lokajn informojn. Ni ofertis ankaŭ “Esperanto in Your Pocket” kaj folion pri korespondaj kaj interretaj kursoj. ★



Ero de Hazel Green.

*Maldekstre:
Hazel Green gvidas
Esperantan lingvo-sesion.*

specialised language curriculum development. The student must show that they are able to analyse the needs of a wide range of language student groups, and then apply modern teaching methodologies - and communicative techniques - to design a detailed curriculum, including course materials, suitable for the target audience. Not an easy task.

It is worth mentioning, that Miranda Lutz received her **ADVANCED**

Certificate **with distinction**. Congratulations, Miranda!

I kindly ask that perhaps some of the more experienced translators send an Esperanto version of this message to the international community mailing lists.

Kindest regards to all,

Igor Couto ★

Vizito al monto kaj kavernoj



de Kam Lee

La monto *Napier* estas morta vulkano proksimume 270 km oriente de Melburno, kaj estas la plej lastatempa aktiva vulkano en Viktorio, eruptinte antaŭ 7200 jaroj. La konusforma monto unue nomiĝis *Taa puuk* aŭ *Tapoc* en la lingvo de la indiĝenoj de la *Gurndiŝmara* tribo, sed poste estis renomita.

Je 440 m super la marnivelo, kaj starante 150 m super la ĉirkaŭa ebenaĵo, monto *Napier* estas la plej alta loko kaj unu el la multaj vulkanoj en la distrikto *Okcidentaj Ebenaĵaj* de Viktorio. Fakte, ĉi tiu distrikto estas nur parto de eĉ pli granda vul-

kana sistemregiono nomita *Provinco de Junaj Vulkanaj* (angle *Newer Volcanics Province*), kiu etendiĝas el Sud-Aŭstralio al Nova Sud-Kimrio kaj kovras 15000 km² de sudorienta Aŭstralio, kaj enhavas la plej junajn vulkanojn en Aŭstralio.

Mi iris kun kvar amikoj al monto *Napier* (vidu la supran foton) dum Aŭstralia Tago, 2008. Oni bezonas proksimume 30 min por piediri al la supro de la vulkano. Mi taksas ke la diametro de la kaldrono estas proksimume 200 m.



Maldekstre:

En la fono vidiĝas la rando de la vulkano. Malantaŭe estas la kratero, kiu estas kovrita de herboj kaj kelkaj arboj. Maldekstre al dekstre sidas Steve, John, Lorna, kaj Kam.

Dekstre:

Sidante sur la rando de la kratero. Oni povas rimarki ke kelkaj partoj de la rando estas ebenaj, kaj en la fono oni povas vidi ke la rando estas tre roka. Maldekstre al dekstre estas Kam kaj John.



Maldekstre:

La dekstra flanko de la bildo montras la rando de la kratero kaj la maldekstra flanko montras la pezaĵon, kiu estas videbla el la vulkano. Maldekstre al dekstre sidas Lorna, John, Elana, kaj Steve.



Dekstre:

Piediranto staranta ĉe la rando. Hazarde, mi vidis nekonatan piediranton sur la rando. Oni povas vidi la profundon de la kratero. Sendube la vulkano estas tre vizitinda loko.



Dum la nokto ni dormis en ruldoparko en *Hamilton*, kiu estas proksimume 16 km norde de monto *Napier*. La venontan tagon, ni vizitis al la kavernoj de *Byaduk*, kiu estas indiĝena vorto por milithakileto (angle *Tomahawk*).

La plej grandaj de la kavernoj estas 18 m larĝaj kaj 10 m altaj. Ili povas esti ĝis 20 m sub la tero, kaj ili estis formitaj per la solidiĝado de la lafa rivero de la *Harman* valo.

Angulflugilaj (angle *bent-winged*) vespertoj loĝas en la kavernoj, kaj per la uzado de etiketoj, oni povas dedukti ke kelkaj el ili elvenas el *Naracoorte* (Sud-Aŭstralio) kaj *Warrnambool*. Dum ni estis en la kavernoj, ni ne vidis ĉi tiajn flugkapablajn mamulojn.

Poste ni veturis proksimume 10 km al belvidejo de la valo *Harman*. Ni vidis en la malproksiman monton *Napier* kaj proksime la *Harman*-valan lafan riveron, kiu estas 24 km longa kaj kies fonto de lafo estas el



Maldekstre:

Kam Lee sidas ĉe la supro de la malfermo de unu de la kavernoj.

Dekstre:

La tegmento ne estis sufiĉe dika kaj forta por subteni sian pezon, kaj ĉi tiu parto de la kaverno kolapsis.



la monto Napier. Ĉi tiu lafa rivero trafas ĉe Tyrendara la lafan riveron de la monto Eccles, kiu estis formita antaŭ proksimume pli ol 30000 jaroj. La tuta longo de la du lafaj riveroj rezultis, ke ĝi estas unu el la plej longaj lafaj formacioj en la suda hemisfero. ★



Dekstre:

Oni povas vidi la maldikecon de la tegmento de la kaverno, kaj jen la kialo de la kolapso.

Maldekstre:

Granda ĉambro en la kaverno. Plantoj kreskas je la malfermo de la kaverno. La kaverno estis malvarmeta, kvankam estis tre varme ekstere! Maldekstre al dekstre: Steve, Elana, John, kaj Lorna.



Dekstre:

La restaĵo de la Harman vala lafa rivero. En la fono estas la monto Napier.



Rakonto pri la prelego de Penny Vos pri la aŭstralia LOTE projekto

ĉe la Aŭstralia Esperanto-Kongreso, 2008 en Hobarto

de Dianne Lukes

Jen foto de Penny Vos kaj la Tasmania parlamentisto, Ross Butler, kiu ĉeestis la fermitan ceremonion de la Aŭstralia Esperanto-Kongreso, por aŭdi la prelegon de Penny pri kiel nia registraro povus enkonduki Esperanton en nian bazan edukadan sistemon. Li tre ŝatis tion, kion li aŭdis kaj promesis subteni ĝin.

Nun estas ĝusta tempo en Aŭstralio por fari ĝin, ĉar la registraro subtenis la instruadon de aliaj lingvoj ol la angla (*LOTE - Languages Other Than English*) tra la edukada sistemo dum la pasintaj 20 jaroj. Tiu kostis kelkajn centojn da milionoj da dolaroj sed ĝi tute ne sukcesis. Aŭstraliaj junuloj ne estas dulingvanoj nun. Eĉ la registraro konfesas, ke la nuna *LOTE*-instruado en Aŭstralio malsukcesas. Ili uzas la vorton *krizo* pri la situacio nun.

Je la sama tempo ni havas novan ĉefministron, Kevin Rudd, kiu parolas la ĉinan flue, kaj certe subtenas, ke aŭstralianoj iĝos pli multlingvaj ol ili nun estas. Ankaŭ la nova usona prezidento, Barack Obama, certe subtenas universalecon.

Do, Penny montras, en sia libro, *Australian LOTE*, kiel se ĉiuj infanoj lernas Esperanton dum 7 jaroj en la bazaj lernejoj, tiam ĉiuj estos dulingvanoj kiam ili havos 11 aŭ 12 jarojn. Tiam ili estos bone preparitaj por lerni alian nacian lingvon en la altlernejo.

Dum la infanoj lernas Esperanton ili gajnos memfidon pri lingva lernado, kaj jam havis eblecojn en la aŭstraliaj lernejoj por kontakti homojn, kiuj konas Esperanton tra la tuta mondo kaj gajni de ili la komprenon de multaj aliaj kulturoj.

Eble la plej grava efiko estus la influo sur la aliajn angle-parolantajn landojn. Esperantistoj en Anglujo jam havas la *Springboard*-projekton, kiu estas simila, do se Aŭstralio faros tiel, ni esperos, ke Anglujo baldaŭ sekvos nin. Tiam eŭropanoj povos vidi, kiel la lernado de Esperanto en la lernejoj ankaŭ helpas ilin.

Kiam mi loĝis en Ĉeĥio dum 2005 kaj 2006, mi ofte aŭdis, ke eŭropanoj opinias, ke lerni Esperanton ne helpus ilin ĉar denaskaj angle-parolantoj neniam lernos alian lingvon kaj certe ne Esperanton, ĉar ili opinias, ke ili jam havas la internacian lingvon, la anglan.

Tiu estas la kialo, ke mi tiel fervore subtenis Esperanton kiam mi revenis al Aŭstralio, eĉ kiam mi ne estas sufiĉe juna por fari pli. Ankaŭ mi esperas ke multaj altnivelaj Esperantistoj translokiĝos al Aŭstralio, tiel rapide kiel eblas.

Ni ne bezonas bonajn Esperantistojn por instrui en la lernejoj. La genio de la propono de Penny, estas ke ŝi montras kiel ĝeneralaj instruistoj en bazaj lernejoj mem povas instrui lingvon tiel regulan kiel Esperanton, eĉ kiam ili ankoraŭ ne scias ĝin. Tiam ili ankaŭ lernas ĝin dum la instruado. Do, estontece miloj da aŭstraliaj instruistoj estos Esperantistoj!!! Sed, dum la enkonduko, mi opinias ke estus multaj registraraj postenoj por altnivelaj Esperantistoj.

Penny ne nur montris, kiel la ĝeneralaj instruistoj en bazaj lernejoj mem povas instrui la lingvon sed ŝi ankaŭ kreis rimedilojn por helpi ilin fari ĝin en iliaj klasĉambroj. Penny havas sperton, ĉar ŝi mem lernis Esperanton, kiam ŝi instruis ĝin en sia lernejo. Ŝi scias, ke ŝi bezonis rimedilojn, kiujn ŝi ne povis trovi, do nun ŝi ja kreas ilin.

Kiam la Estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio Lim. faris strategian planon en Hobarto, tiam la plej grava agado, pri kiu ni konsentis, estis la enkonduko de Esperanto en bazajn lernejojn, do, ni ĉiuj subtenas la strebon de Penny.

La prezentado de Penny estis la unua publika anonco de la ideo, kaj pro tio ĝi estis la plej grava afero, kiun ni faris tie. Mi esperas, ke vi nun sentas, ke vi ankaŭ estis tie kun ni. Se vi volas vidi plu, iru al www.mondeto.com. ★



Supre:

Maldekstre al dekstre staras Ross Butler, Penny Vos, Dianne Lukes kaj Robert Budzul.

Bonan vojaĝon!

Proponoj por interret-esplorantoj

de David Ryan

Jam dum multaj jaroj mi ofte mendas flugojn kaj hotelĉambrojn per la interreto – estas ĝenerale malpli koste ol viziti vojaĝagentejon. Tial, mi kredas ke mi estas kvazaŭ spertulo en per-interreta vojaĝmendado. Mi prezentas ĉi-sube kelkajn ĝeneralajn konsilojn, laŭ mia sperto, por tiuj, kiuj volas mendi per la interreto.

Prezoj por hotelĉambroj povas esti pli malmultekostaj se vi kontaktas rekte la hotelon por peti prezon. La respondo ofte estas “ni volonte ofertas specialan rabatprezon precipe por vi, sinjoro”. Tiu metodo estas tre bona se vi volas mendi ĉambrojn ankaŭ por infanoj, ekzemple se vi estas familio kun du infanoj. Mendsistemoj per interret-paĝoj ofte diras, ekzemple, ke “ĉi tiu ĉambro akceptas nur tri personojn (du plenkreskulojn kaj nur unu infanon)”. Tamen, se vi kontaktas rekte la hotelon vi povos klarigi ke du junaĝaj infanoj povas dormi en la sama lito. Tiel, ili egalas al unu infano.

Tripadvisor.com estas interesa paĝo por legi komentojn pri hoteloj. Mi trovas, tamen, ke kelkaj personoj rekomendas hotelon kaj aliaj ne. Kelkaj diras ke blatoj troviĝas en la banĉambroj kaj la hotellaborantoj “ne parolas anglan” (!), sed aliaj diras ke la hotelo estas tre luksa kaj komforta. Pro tio, mi ne ĉiam scias ĉu hotelo estas bona aŭ ne. Se estas nur malbonaj komentoj pri hoteloj, tamen, ŝajnas ke la hotelo ne estas tre rekomendinda.

Youtube.com ankaŭ estas rekomeninda paĝo en kiu oni povas vidi vidbendojn fare de turistoj mem de hotelo aŭ turisma loko.

Paĝoj kie oni povas serĉi samtempe prezojn de diversaj flugkompanioj (kiel ekzemple *houseoftravel.co.nz* aŭ *expedia.com.au*) ne serĉas ĉiujn flugkompaniojn, ofte nur la plej gravajn. Por scii kiuj flugkompanioj ofertas flugojn el via urbo, necesas nur konsulti la retpaĝon de via loka flughaveno. En tiaj listoj vi trovos mencion ankaŭ de *mal-*





multkostaj flugkompanioj kiuj ĝenerale ne aperas en ĝeneralaj serĉpaĝoj. Poste, konsultu la retpaĝon de ĉiu flugkompanio.

En ĉiu flugo/aviadilo estas diversaj kategorioj de prezoj (laŭ ŝanĝebleco kaj aliaj vendkondiĉoj). Se vi volas aĉeti pli ol unu bileto, ni diru por tri plenkreskuloj, ne entajpu “3” en via serĉpeto. Se en via dezirata flugo estas nur 2 liberaj seĝoj je pli malmultkosta kategorio (ni diru je \$100), la serĉrezulto montros 3 liberajn seĝojn je la sekvanta pli altkosta kategorio, ni diru je \$150. La serĉilo ne kapablas informi vin ke 2 seĝoj haveblas je \$100 kaj unu je \$150.

Pensu pri diversaj flugvojoj. Se vi volas mendi flugbileton de Perto al Christchurch, ne entajpu “Perto al Christchurch” – plejmultaj serĉpaĝoj donos al vi la *normalan* prezon per *Air New Zealand* aŭ *Qantas*. Esploru diversajn vojojn, ni diru de Perto al Brisbano per *Qantas* kaj de Brisbano al Christchurch per *Pacific Blue*. Ne ĉiam – sed ofte – estas malpli koste.

Bonan vojaĝon! ★

Australian Esperanto Association Limited President's Report

It was with great pleasure and a fair measure of trepidation that I agreed to take on the role of President of such an august body as the Australian Esperanto-Association on the 1st of May this year.

I was very fortunate to be coming into this role when all the hard work was just about complete to bring the Australian Esperanto Association up to date with the present requirements for an organisation of this size and scope. We had to comply with Government regulations so the present not-for-profit company limited by guarantee was formed. We were able to retain our original name but just needed to add "Limited" or "Ltd" when writing it. This has taken only a few words to say what has happened, but in fact it has taken very many hours by very many people to accomplish the task. As a matter of fact it was due to the extremely high level of commitment and leadership of the previous President, Igor de Oliveira Couto, and the team of dedicated Esperantists that rallied around him, that we now have a fully functioning, Government-registered company to care for the affairs of Esperanto in Australia.

I say I was fortunate to become president at that time but this is also because at last there is a growing international awareness that the world needs a language such as Esperanto. I don't think they will take long now, to realise that Esperanto already exists. There is a growing number of members of the EU Parliament who are supporting the introduction of Esperanto as their working language. There are many more universities and schools in China where Esperanto is being taught. There were nearly 500 Japanese Esperantists enrolled to attend the Japanese Esperanto Congress 2008, in Wakaiyama recently. The number of radio stations, which are regularly broadcasting in Esperanto, is increasing. The number of Esperanto entries in Wikipedia is phenomenal. All this shows that there is a definite under-swell of interest in Esperanto, no doubt immensely helped by the spread of internet and electronic capabilities. The internet is not only spreading the teaching of Esperanto, it is also uncovering the need to have such a language as Esperanto for people from all language groups to communicate quickly and clearly with each other.

Another and probably the most important reason why I am fortunate to be in this position, at this time, is the new project being developed by one of our members, Penny Vos. This is the best chance Esperanto has ever had (maybe anywhere in the world) to be introduced into Government schools as a part of all children's normal curriculum. Australian children will have the chance of learning English, Maths and Esperanto, at the age when it is easiest for them to learn a language if Penny's project succeeds. Already the Hon. Julia Gillard, the Federal Minister for Education, has said she has "noted the ease and advantage of teaching Esperanto" in response to information about the project from Penny.

At present the members of the Board of the Australian Esperanto Association Ltd are settling into their new roles. Like getting used to a pair of new shoes, there has been some pain in this but we are adapting and soon we will be feeling comfortable and everything will be better than before. One of my personal problems in steering the Esperanto ship has been keeping up with communicating with everyone that feels that they should have access to the ear or eye of the President. I think it is important that I keep abreast with Australian news and what is happening with Esperanto throughout the world in case I should contribute anything. I read most e-mails which I receive each day but only have the time to answer a very few of them. The letters that I most rarely answer are those that ask me a lot of questions that they either already know, or could find them out some other way than by asking the President. Ralph Harry told me he had the same problem when he was President. He said, he just did not answer them and soon they stopped writing, so I am following his example. On the other hand if there is an issue which requires the attention of the President, then I try very hard to give it my best effort.

I have had the pleasure of having a Board of most talented and experienced volunteers working with me. Our Director for Education, Jennifer Bishop, brings to this position a lifetime of Esperanto experience and fun as well as a knowledgeable and musical husband. There is our Director for Publicity, Tim Wade Ferrel, who has a wealth of knowledge about how to do anything that a club could need. As a chiropractor, he has a good understanding of what makes people tick and how to reach out to them. I am confident that he will find the best possible ways to inform and educate people about Esperanto, which will lead to the success of Penny's project.

Then there are the four wheels that hopefully keep the train on the track. There is me the President, whom I think you have heard enough about. There is Steve Pitney, who does an absolutely wonderful job as Director of Finances, as you will see by his meticulous presentation of the accounts. He has been doing this voluntary service for Esperanto for how many years, Steve? There is John Abood, our dentist from Gladstone in northern Queensland. Even right up there he carries forward the task of Director of Administration and sees to it that AEA Ltd toes the line as far as Government regulations and requirements are concerned as well as many more mundane administration tasks. Last, but certainly not least is Miranda from the famous Esperanto family, Lutz, who is the Director for Member Services. It is she who does the mammoth job of keeping track of the members and has to worry about such things as the Official Secrets Act. Miranda, having been an Esperantist since high school, is our youngest Board member, and is also very involved with Esperanto Youth Affairs both in Australia and overseas.

We still need a Director of Implementation to join our team. This could be a person who likes to party. Someone who has ideas about how to provide the chances for Esperantists to come together and use their special language. Arrange home-stays with other Esperantists in Australia or even more fun in other countries where they don't have the same mother tongue. This person could have the pleasure of arranging the next Australian Esperanto Congress in their own home town, with the assistance of their local members and the other Board Members, of course.

Another most important group of highly talented Esperantists are the AEA Ltd Commissioners. They generously volunteer their time to give essential services to our organisation. They are Tasmania's own Robert Budzul who is in charge of the Book

Service, and who also had the key role in organising this Congress; Hazel Green from Queensland who has been developing our wonderful new correspondence courses. She has been caring for the correspondence courses for more years than either of us would like to admit; Trevor Steele, our home-grown author of many wonderful Esperanto novels and is our official Examiner; Sándor Monostori who with New Zealander, Chris Krägeloh are the editors of Esperanto sub la Suda Kruco – Esperanto under the Southern Cross – although it is new for both of them, they have taken the AEA magazine to another level in readability and interesting stories. The latest one to join this eminent level is Kam Lee as Returning Officer. He has always been at the centre of Esperanto events with his camera at hand.

Then there are our members and that includes all the above. There are the Esperantists, who go to classes, attend meetings, have picnics together, travel in other countries using the International Passport Service, attend Conferences, Congresses and other events both in Australia and overseas, listen to radio broadcasts and speak on Skype just so they can use their dear Esperanto.

So this has been the Australian Esperanto Association Ltd, 2008, from the President's Chair ★

Diano (diannelukes@yahoo.com)

25th of October, 2008



*On the left:
At the conference in Hobart.*

Agadoj de la Estraro de AEA kaj AEA Lim. dum la jaro ĝis oktobro 2008

(La Estraro kutime havas malpli ol sep volontuloj)

Membraĵ Servoj

- Kontrolo kaj disdonado de la revuo *ESK*
- Aranĝis por la transdonado de *ESK* al la novaj redaktoroj
- Provizis kaj kontrolis la forumon de *AEA* por membroj kaj la publiko
- Produktis podkastojn *Tuj*
- Provizado de la libroservo – kolekti abonajn, mendis kaj liveris librojn, ktp.
- Aranĝis la movadon de la libroservo al Hobart
- Aranĝis jarkunvenon kaj kongreson en Hobarto – oktobro, 2008
- Preparis la somerkursaron en Sidnejo en januaro, 2009
- Kolektis monon por Aŭklando en januaro, 2008
- Kolektis donacojn por *UEA*, *3ZZZ*
- Administris korespondan kursaron
- Administris nian oficialajn interretajn forumojn
- Aranĝis saĝojn pri ekzamenoj
- Donis periodon de ses monatoj sen kosto al *AEA* membroj

Projektoj

- Subteno por Oceania projekto en Indonezio
- Subteno por *La Aŭstralia LOTE projekto*, por enkonduki E-on en bazaj lernejoj
- Subteno por instruistoj ĉe la 2008a Oceania Kongreso en Aŭklando
- Produktis novan libreton por infanoj (ankoraŭ ne presitan)
- Konservis nian nacian bibliotekon - konservis kaj komencis katalogi la enhavon
- Muntis informadan budon kaj subtenis lingvan konferencon en Melburno
- Informado – preparis allogajn afiŝojn *teaser campaign*
- Komencis laboron pri efektiva strategia plano por *AEA Lim.*

Ĝeneralaj Aferoj

- Administris la aferojn de nia asocio
- Finfinis la ŝanĝon de la strukturo de *AEA* al la kompanio, *AEA Lim.*
- Aranĝis poŝtan voĉdonon al ĉiuj niaj membroj
- Registris financojn, kontrolis reinvestojn, ricevis monon, disdonis kvitancojn ktp
- Nomis la kontroliston de kontoj kaj la kontrolanton de voĉdonado
- Aranĝis sekurecon
- Aĉetis novajn ilojn inkl. de lasera prestilo, komputiloj
- Respondis al multaj diversaj petoj de nia membroj
- Subtenis lokajn Esperantajn grupojn
- Interrilatis kun *UEA*, eksterlandaj asocioj kaj la ĝenerala publiko
- Ĝisdatigis la retlokojn de *AEA*

La projekto lingvohelpilo

Kadre de la projekto *lingvohelpilo* bezonatas kolekto de frazoj kun gramatikaj eraroj en Esperanto, ekzemple "Kvin euroj po persono" kaj "Mi havas hundo". Tia kolekto multe helpus al la projekto antaŭvidi eblajn erarojn kaj laŭeble bone trakti ilin per la nun farata gramatikkontrolilo.

La ideo pri ĉi tiu projekto fontas el ĉiutaga bezono je lingva kontrolado de Esperanto-tekstoj kaj helpado pri ties verkado/legado. Evoluoj de tekniko ne nur fortigas tiun bezonon, ĝi ankaŭ donas ilojn por ĝin plenumi. Bona lingva kontrolilo por Esperanto estus utila en ĉiaj tekstaj redaktiloj, retpoŝtprogramoj, retumiloj kaj lokoj en la reto kie oni skribas en Esperanto (forumoj, bablejoj, blogoj). La projekton gvidas Eckard Bick (<http://visl.sdu.dk/visl/about/eckhard.html>).

Aliaj teamanoj estas i.a. Marek Blahuš, Bertilo Wennergren kaj Sonja Petrović Lundberg, kaj la projekton subtenas la fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*.

Estus tre bone se pluraj povus kontribui per eraraj frazoj. La plej simpla maniero estas elŝuti la aparte por tiu celo kreitan aldonaĵon por la retumilo *Fajrovulpo* (angle Firefox) kaj ĉiun fojon kiam vi rimarkas eraron en iu retpaĝo per simpla musklako raporti ĝin. Ĉe <http://lingvohelpilo.ikso.net/firefox/> eblas elŝuti la aldonaĵon kaj lerni kiel uzi ĝin. Se vi ŝatus kunlabori, sed ne volas uzi la retumilon *Fajrovulpo*, tiam eblas rigardi kaj enmeti frazojn ĉe <http://vikio.ikso.net/Projektoj/GramatikKontrolilo/Eraroj/>.

La gramatikkontrolilo estos farita per CG-tekniko (CG estante mallongigo por la angla *Constraint Grammar*).

La baza ideo de la projekto estas krei kombinitan literum- kaj gramatikkontrolilon por Esperanto, kiu krom kontroli tekstojn ankaŭ donus aŭtomatajn pedagogiajn konsilojn kiel plibonigi ĝin, kaj estus utila ne nur por spertaj Esperanto-uzantoj kiuj nur faras fojfojn tajperarojn, sed ankaŭ por komencintoj kaj progresantoj. Tial ni nomas la projekton *lingvohelpilo* kaj ne nur gramatikkontrolilo aŭ simile. En la unua fazo de la projekto, kiu finiĝos post unu jaro, ni planas krei nur retan lingvohelpil-interfacon, sed en postaj fazoj ni esperas integri ĝin ankaŭ kun diversaj tekstredaktiloj, retpoŝtpro-

gramoj, retumiloj kaj simile. Septembre aŭ oktobre ĉi-jare devus aperi unua testversio de la reta interfaceto.

Por atingi laŭeble bonan rezulton, ni bezonas ekzemplojn de plej diversaj gramatikeraroj en Esperanto, en diversaj kuntekstoj. Ne gravas se vi proponas frazon kun erartipo kiu jam ekzistas en la listo aŭ kiun vi jam raportis antaŭe, estus nur avantaĝo havi saman erartipon en diversaj kuntekstoj. Aldone, se vi havas spertojn pri CG-tekniko (aŭ pretus spertiĝi) la projekto ĝojus ricevi vian helpon pri regul-verkado. ★

**"bezonatas
kolekto de frazoj
kun gramatikaj
eraroj en
Esperanto"**

Sonja Petrović Lundberg



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
esk@esperanto.org.au

Donald Rogers | Treasurer
dero9753@ihug.co.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@whoosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

John Abood | Dir. of Administration
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Tim Wade-Ferrell | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

(casual vacancy) | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejo!

de la 11a ĝis la 25a de januaro 2009

- komforta loĝado en la urbocentro de Sidnejo
- kursoj por ĉiuj niveloj – kaj speciala kurso por infanoj
- vizitu la Havenponton, la Operodomon, kaj la plaĝon de Manlio
 - ekkonu la ekzotikajn faŭnon kaj florojn de Aŭstralio
- ludu, babilu kaj societumu kun esperantistoj el la tuta mondo
- eltrovu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
 - ekskursu al la klifoj kaj kavernoj de la magiaj Bluaj Montoj
- partoprenu la viglan noktan vivon de Sidnejo – per Esperanto



<http://aesk.esperanto.org.au>